tempo

Gazeto de Kroata Esperanto-Ligo
Časopis Hrvatskog saveza za esperanto

julio 2017 / n-ro **129**

La centa jubileo de la morto de Zamenhof en Kroatio

Esperanto kandidatas por la nacia listo de nemateria kultura heredaĵo en Kroatio

Bjelovar invitas al Inter-fest

La jaro 2017 - la lasta jaro de nia gazeto Tempo en la presita formo

Karaj legantoj

Vi havas en viaj manoj la 129-an numeron de *Tempo*, la unuan numeron de la jaro 2017.

La jaro 2017 estas la centa jubileo de la morto de **Zamenhof**, omaĝata tutmonde sub la signo de UNESCO. Kroata komisiono por UNESCO estas la protektanto de kulturaj programoj honore al Zamenhof, kreataj de Kroata Esperanto-Ligo.

Ĉi tiun numeron de *Tempo* enkondukas artikolo de **Nikola Rašić** honore al **Zamenhof** okaze de la centa jubileo de la morto de la iniciatinto de la Internacia Lingvo Esperanto.

KEL organizis multajn diversajn aranĝojn en 2017. Ministerio pri kulturo de Respubliko Kroatio aparte finance helpis al nia muzik-literatura aranĝo *La libro „Zamenhof-Strato" en Zamenhof-Strato* kaj al la koncerto de junaj kroataj muzikistoj **Kaja Farszky** kaj **Nenad Sinkauz** kiuj honoras la aŭtoron de la Internacia Lingvo. La aranĝo okazis en la zagreba Zamenhof-Strato la 25an de majo je la 18a horo.

Sur la titolopaĝo salutas vin junaj vizaĝoj de esperantistoj kaj gastoj dum la muzika koncerto de **Kaja Farzsky** kaj **Nenad Sinkauz** en Zamenhof-Strato en Zagrebo, en la belega ĝardeno de Akademio de pentroarto. Fotis **Jadranka Farzsky**. La tria de maldekstre estas juna kroatologo **Domagoj Vidović,** la tradukinto de *Zamenhof-Strato* de **Roman Dobrzyński** en la kroatan.

La zagreba urbestro lanĉis unufojan helpon al kelkaj asocioj. Kroata Esperanto-Ligo gajnis financan helpon de 10.000 kn por ke junaj esperantistoj enkadriĝu en la jubilean jaron de **Zamenhof**. La muzik-literatura aranĝo en **Zamenhof-**Strato de **Zagrebo** estis unu ero el la junularaj agadoj. en 2017.

Neniam pli da TV- kaj radio-raportoj pri nia agado estis realigitaj en la jaro kiu honoras Zamenhof-on. Aŭdu kaj eĉ vidu ĉiuj ĉi raportojn en http://www.esperanto.hr/agado_zam_jaro_2017.htm. La motoro realiginta tiujn elsendojn estis **Judita Rey Hudeček**, kiu okazigis la 5an de majo 2017 en la biblioteko *Bogdan Ogrizović* renkontiĝon de kvindeko da esperantistoj, kiuj per bildoj rememoris la malnovan tempon. La programo nomiĝis *Memoralbumo.*

Samtage **Spomenka** Štimec prelegis en la zagreba *Biblioteko Travno* pri *la kroata literaturo kaj Esperanto.* La programon organizis esperantistino **Vesna *Radošević***.

La centra monda omaĝo al **Zamenhof** okazis en **Varsovio** per riĉa tritaga programo 29-30-an de aprilo. Esperantistoj alvenintaj al la festo en Varsovio partoprenis interesan konferencon honore al **Lazaro Ludoviko Zamenhof**. Kroata Esperanto-Ligo ricevis por **Spomenka** Štimec financan subtenon de Ministerio pri kulturo de Respubliko **Kroatio**. Ŝi iniciatis en **Varsovio** la saman programon kiel en la zagreba **Zamenhof-**Strato: legadon de fragmentoj el la libro *Zamenhof-Strato* en pluraj lingvoj. Dum promeno tra la varsovia **Zamenhof-**Strato, antaŭ la belega novkonstruita muzeo pri la juda kulturo POLIN esperantistoj okazigis publikan legadon de fragmentoj el la libro *Zamenhof-Strato* de **Roman Dobrzyński**. En **Varsovio** renkontiĝis la libro kaj la strato honore al **Zamenhof**. **Spomenka** Štimec legis tie la kroatlingvan fragmenton el la libro en traduko de **Domagoj Vidović**.

Zagrebaj Esperanto-Societoj dum la tuta jarduono okazigis siajn programojn. Kroata Fervojista Esperanta Asocio kun sia prezidantino **Marica Brletić** havis ĉiusemajnan programon. Esperanto-Societo *Tibor Sekelj* sub prezido de **Krunoslav Tišljar** okazigis programojn unu fojon ĉiumonate. KFEA ne mankis en la ĉi-jara internacia kongreso de esperantistoj-fervojistoj en **Colma**r en **Francio,** kie prelegis **Zlatko Hinšt.**

Malbona novaĵo: Ni devas informi vin ke la multjara financanto de Tempo, Ministerio pri kulturo de Respubliko Kroatio, informis Kroatan Esperanto-Ligon ke ĝi ne plu

Anto i Zamenhof. Fotis Davor Klobučar

povas financi la paperan version de Tempo, konforme al la rekomendoj de Eŭropa Komisiono. Eŭropa Komisiono konstatis ke **Kroatio** havas tro da presitaj gazetoj (!). Eŭropa Komisiono preferas redukti la nombron de presaĵoj kaj favori aliajn formojn de la informado, ekz. reta kaj similteknika. Ministerio pri kulturo tial decidis estonte financi nur la sonan version de *Tempo* kiun ni jam multajn jarojn produktis sur kompaktdiskoj por vidhandikapitoj, konforme al la preferoj de Kroata unuiĝo de nevidantaj esperantistoj. Tiujn informojn eksciis la membroj de la redakcio, **Antun Kovač** kaj **Spomenka** Štimec, kiuj estis akceptitaj en la Ministerio pri kulturo. Eĉ pli: la Ministerio pretas financi la homojn kiuj produktas la sonan *Tempon* por la nevidantaj esperantistoj kaj por la sona *Tempo* aprobis 12.000 kn por la jaro 2017.

Ni ne permesos ke *Tempo* ĉesu aperadi en la presita formo ĝuste en la jubilea jaro de Zamenhof. Tial tiu ĉi numero de Tempo espereble ne estas la lasta presita numero en 2017. Ni estas dankaj al Ministerio pri kulturo, ke ankaŭ estonte ĝi volas subteni almenaŭ nian sonan *Tempon*.

Ĉu vi havus intereson estonte aŭskulti *Tempon* aŭ legi ĝin rete? Ni estus dankaj por via respondo. Sciu ke ĉiuj numeroj de *Tempo* (ekde 1980 ĝis 2017) estas legeblaj en niaj retpaĝoj ĉe: http://www.esperanto.hr/tempo_kel.htm

En tiu ĉi numero de *Tempo* ni dediĉis plenan artikolon al la

Fondita en 1980. Ne aperis en la militaj jaroj 1993 kaj 1994. Aperas laŭeble kvar foje jare. Jaro XXXVI numero 129 (1-2017).
ISSN 0352-1583. Tiu ĉi numero estas eldonita per financa helpo de **Departemento Krapinsko-Zagorska** al **Esperanto-Societo Trixini Hrašćina**. *Tempo* aperas sone sur kompaktdisko ĉe Unuiĝo de nevidantaj esperantistoj per financa helpo de Ministerio pri kulturo. Voĉlegas Spomenka Štimec.

tempo

Redakcio/Uredništvo; **Eldonisto**/Izdavač: Hrvatski savez za esperanto/Kroata Esperanto-Ligo, Kneza Mislava 11/III, HR 10000 Zagreb, Kroatio, tel. +385 (1) 4617550, poš.tel. +385 (91) 4617550; esperanto@zg.t-com.hr, **www.esperanto.hr**
IBAN HR6124840081100881157; OIB 53992829935
Kontribuis: Božidar Brezinščak Bagola, Jadranka Farszky, Carlos Filho, Davor Grgat, Rikard Jorgovanić, Davor Klobučar, Antun Kovač, *Loka festivala komitato Bjelovar*, Teodora Kučinac, Zlatko Hinšt, Zlatoje Martinov, Anto Mlinar, Anton Mihelič, Vjekoslav Morankić, Nenad Opačić, Nikola Rašić, Judita Rey Hudeček, Biserka Rožić-Šutej, Andrzej Sochacki, Mavro Špicer, Ivan Špoljarec, Spomenka Štimec, Zlatko Tišljar, *Voko el Stirio*.
Redaktoris: Spomenka Štimec. **Grafika aranĝo kaj prespreparo:** Ivan Špoljarec. **Presis:** Urednik d.o.o., Zagreb
Anonctarifo:1/1 paĝo 1000kn (135 eŭroj), ½ paĝo 500 kn (68 eŭroj, lasta titolpaĝo 2500 kn (3.28 eŭroj). **Abono** por 4 numeroj jare 60 kn. Por eksterlando 10 eŭroj. Unuopa numero enlande 15 kn,eksterlande 3 eŭroj.
La redakcio ne respondecas pri la opinoj de la subskribitaj artikoloj.
Foto sur la titolpaĝo: **Junaj esperantistoj kun gastoj en Zamenhof-Strato.** Fotis Jadranka Farszky

Esperanto-eventoj en **Kroatio** en 2017.

Kiam polaj esperantistoj sukcesis en 2015 enmeti Esperanton en la nacian liston de heredaĵoj en **Pollando**, la irlanda diplomato kaj prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio **Sean O'Riain** konsilis ke pluraj Landaj Asocioj imitu **Pollandon** kaj klopodu meti Esperanton sur la nacian liston de kultura heredaĵo de sia propra lando. Ni ne havis multan esperon ke io tia povus sukcesi en **Kroatio**. Svisaj esperantistoj klopodas meti Esperanton sur la nacian liston de nemateriaj valoroj de **Svislando**.

Kroata Esperanto-Ligo preparis la dokumentojn kaj eniris la procedon de enmeto de Esperanto en la kroatan nacian liston de la protektata nemateria heredaĵo. La dokumenton preparis **Spomenka** Štimec. Estis agrabla suprizo kiam **Zrinka Mažar**, estrino de la Sekcio pri la moveblaj kaj nemateriaj kulturaj valoroj el la Urba instituto por protekto de la monumentoj de kultura valoro informis, ke nia peto pri Esperanto sukcese trairis la unuan pritaksadon kaj ekde marto 2016 ĝi estas traktata en Ministerio pri kulturo.

Ni publikigas la unuan pozitivan dokumenton pri la pritaksado de Esperanto por la nacia kroata listo de protektata nemateria heredaĵo, verkita de **Silvio Novak**, estro de la Urba instituto por la protektado de kulturaj kaj naturaj monumentoj.

El multaj aliaj novaĵoj ni elektis:

En **Brazilo** aperis la dua eldono de Zagreba Metodo. En februaro, dum vizito de la altranga funkciulo de Eŭropa Komisiono el Bruselo al **Zagrebo** D-ro **Vytenis Andriukaitis**, la zagreba oficejo de EU enmanigis

al la gasto la kroatan tradukon de lia prelego pri eŭropa lingvoproblemo el **Nitra** 2016. La saman kroatan tradukon de **Božidar Brezinščak Bagola** publikigis ankaŭ la reta gazeto el **Istrio** *ZVONA i NARI Daily.*

La lastjara Universala kongreso de Esperanto en **Nitra** ankoraŭ reeĥas en **Kroatio**. Sian vojaĝprozon *Kongreso en Nitra* la tradukisto **Brezinščak Bagola** publikigis en la Revuo *Hrvatsko zagorje*, decembro 2016. La sama teksto aperis en la literatura revuo *Republika, februaro 2017* kaj en la slovena retejo *Štajerske novice* la 13an de aprilo 2017. Vidu ĉe: http://www.esperanto.hr/uk_memoroj.htm#bagola

En la tombejo en **Makarska** estis enterigita en sia 91-a jaro fidela kroata esperantisto kaj fakulo pri olivoleoj **Ivo Puharić.**

Dudek kvin kroataj esperantistoj partoprenis en **la Alp-Adria** programo honore al **Zamenhof** en **Brežice** (**Slovenio**) aprilo 2017. Raportas **Anto Mlinar**.

Spomenka Štimec por sia kroata prozo rilatanta al Esperanto, *Dom u Srednjoj Europi* estis premiita per la ĉi-jara literatura premio de la komunumo **Hum na Sutli**, portanta la nomon de la kroata poeto **Rikard Jorgovanić**. Okaze de la transdono de la premio, ŝi en la biblioteko en **Hum na Sutli** voĉlegis la poemon de **Rikard Jorgovanić**, en traduko de **Mavro** Špicer.

Kroata Esperanto-Ligo jarkunvenis la 20-an de majo 2017. Pli frue jarkunvenis la esperantaj societoj en **Bjelovar** kaj **Split**.

Esperanto-Societo *Trixini* la 27an de majo organizis la 21an feston de meteorito en *Hrašćina* kaj prezentis tie *Enciklopedion de Hrvatsko zagorje*. La societo kunorganizis tutsemajnan ekskurson de plurmembra internacia esperantista grupo al **Makedonio**, kadre de la agado de Kroata-Makedona societo.

Zlatko Tišljar kaj **Siniša Dvornik** ĉeestis la 4an de junio la asembleon de Eŭropa Esperanto-Unio kadre de Germana Esperanto-Kongreso en **Freiburg** en **Germanio**.

Višnja Branković el **Osijek** organizas en la banloko **Sokobanja** en **Serbio** Internacian Kongreson de Blindaj Esperantistoj de la 8a ĝis la 15a de julio 2017. Al la kongreso aliĝis 50 esperantistoj el 10 landoj, inter ili kroataj esperantistoj.

Esperanto-Societo **Sisak** preparas la *9an Boatadon sur la Rivero* ***Kupa*** de la 31a de julio ĝis la 5a de aŭgusto 2017.

En Bjelovar dum la tuta jaro daŭras preparoj por la granda aranĝo INTER-FEST kiun bjelovaraj esperantistoj plenenergie preparas. Multaj esperantlingvaj gastoj estas atendataj de la 6a ĝis la 12 de aŭgusto 2017 en Bjelovar.

Ni esperas ankaŭ vin vidi tie, ĉe la plej granda aranĝo en Kroatio en 2017! Bonvenon al Bjelovar!

En aŭgusto en **Los Angeles** aperos la usona eldono de *Kroata milita noktlibro* de **Spomenka** Štimec. La libron el Esperanto tradukis **Sebastian Schulman** por la eldonejo **Phoneme media**.

Por septembro ni anoncas la aranĝon Renkontiĝon de esperantlingvaj verkistoj kaj tradukistoj kaj invitas vin al **Hrašćina** la 16an de septembro 2017 kun gastoj **Mauro Nervi** el **Italio** kaj **Istvan Ertl** el **Hungario**/**Luksemburgo.**

Rijeka atendas nin en la lastaj tagoj de septembro, de la 28a ĝis la 30a por la 110 jubileo de sia Esperanto-Societo. Gratuloj okaze de la mirinda datreveno! Pri tio legu ĉe http://www.esperanto.hr/agado_rijeka_110.htm

Bonan legadon!

Spomenka Štimec

Nova portreto de Zamenhof

Nenad Opačić, la renoma pentristo kaj skulptisto el **Varaždin**, permesis ke ni uzu la portreton de **Zamenhof** en la jubilea jaro. **Opačić** desegnis tiun portreton kadre de sia pentraĵo Kiborg kaj proponis ĝin siatempe, kiam japanaj esperantistoj serĉis solvojn por la titolpaĝo de la traduko de *Zamenhof-Strato* en la japanan. La japana eldonisto tamen decidis uzi dokumentan foton pri holokaŭsto por la titolpaĝo de le japana eldono kaj ne la verkon de **Opačić**. Nun jen la okazo prezenti la nesufiĉe konatan portreton de Zamenhof, kiel fragmenton el la pentraĵo. Esperanto-Societo *Trixini* planas uzi la portreton sur la filatelaĵo – la unutaga koverto, okaze de la Renkontiĝo de verkistoj en **Hrašćina** en septembro.

S.Š.

La portreton vidu sur la paĝo 5.

Kaj la Eternulo diris : "Ili estas unu popolo kaj ili havas unu lingvon kaj la saman parolon .... ili povos atingi ĉion kion ili decidas nur se ili tion ekvolos." [Genezo XI]

Antaŭ cent jaroj,[1] meze de la mond' eterne militanta, mortis homo kiu strebis al sankta amo kaj interhoma harmonio. Li celis disbati la miljarajn murojn kiuj dividas la homaron en diversajn grupojn malamikajn. Li kredis ke interkonsente ekestos planeda homfamilio, nur se popoloj eblos kompreni unu la aliajn. Por ke realiĝu tiu bela revo de l' homaro necesus adopti neŭtralan helplingvon internacian, kiun li kreis por tiu celo: Esperanto.

En la nuna epoko postmoderna, kiam ĉiuj valoroj lozas, tiaj idealoj sonas naive. Eble ĝuste tiel estas. Tamen la brava nova mondo, kun ĉiuj siaj teknikaj eblegoj, ne proponas alternativon, ne promesas plibonigon de interhomaj rilatoj. Tute male: amasas konfliktoj, tempestas militoj, mortas hommiloj kaj ĉiutagas murdoj altare de pacaj dioj (evidente sangavidaj); nome de religioj, demokratioj; nacioj aŭ similaj ioj aŭ alioj.

Pli ol iam ni foras de stato kiam la popoloj ajnon povus fari en konsento, plej laste rondon familian aŭ sanktan harmonion. Eĉ nia planedo, ĝiaj akvo kaj aero, eĉ la tero sub niaj piedoj, minacas malaperi; malgraŭ la ekzisto de la plej perfektaj teknikiloj por produkti, komuniki kaj interproksimiĝi. La mondo mem ŝajnas esti unu granda miskompreno, tiel ke la Futuro minacas malveni. (Nome, ĝi vizitas nur esperdonajn zonojn).

Tamen oni ofte ridindigas homojn kiel Zamenhof, kiu antaŭvidis la minacojn kaj proponis solvojn. Esperantistoj restas figuri kvazaŭ stranguloj kun ideoj pasinteskaj. Sed, ne ĉiuj samopinias, ekzemple Unesko, kiu la jaron 2017 proklamis La Jaro de Zamenhof. Tion oni faris ne nur por konservi la memoron pripasintan sed ankaŭ por doni ekzemplon por la onto; por proponi humanajn alternativojn por pli bona mondo pri kiu Zamenhof revis, mondo de interpopola kompreno kaj ama kunlaboro. Temas pri granda Bono, kiun mondo ĈIAM bezonas, ne nur nun, kiam tio ŝajnas estis afero de pura postvivado.

Estas do bona okazo por redemandi: *Kion Zamenhof al ni donis? Kion Zamenhof signifas por ni, la homoj de hodiaŭ?*

Mi ne volas plu analizi la mondan situacion, kiu estas ĉagrenige klara kaj klare mala al la streboj de Zamenhof. Ĝi estas praktike senespera, dum Zamenhof esprimis sian vizion per unu sola vorto: La Espero. Espero signifas kredon ke la aferoj povas alii, pliboniĝi, ŝanĝiĝi je la bonstato de la homaro.

Ĉu ni rajtas forgesi ĉi-vorton: e s p e r o? Ĉu ni rajtas entombigi la idealon de pli bona morgaŭo? Ĉu ni ne havas respondecon pri la planeda futuro, pri la novaj generacioj? La Futuro havos ŝancon nur se ne mortos la Espero. Jen do, nia misio kiel esperantoj. Zamenhof temas pri la Espero, nenio alia: ĉio cetera estas nur derivaĵoj.

Ni ne forgesu ke Espero estis la lasta restaĵo en la skatolo de Pandora. Ĉu vi memoras tiun antikvan grekan rakonton? Nome, ĉio komenciĝis kiam la titano Prometeo[2] tiom ekamis homojn ke li ŝtelis la fajron de dioj por ĝin donaci al la homoj. Li ankaŭ instruis ilin diversajn lertojn kaj sciojn kaj tiel esence patris la homaron. Homoj ĝis tiam ne vere distingiĝis disde la animaloj, pri kiuj fakte zorgis lia frato Epimeteo[3], kiu ne aparte atentis homojn, ne pli ol aliajn zoojn. La koleriĝinta ĉefdio Zeŭso, kiu timis ke sciaj homoj proksimiĝos al dioj, sendis la ravan Pandora[4] kiel edzinon al Epimeteo.

Pandora ricevis de Zeŭso belan skatolon donacan, kiu enhavis ĉiujn malbonojn kaj plagojn por la homaro. Ŝi fakte neniam devis malfermi la skatolon sed la scivolemo venkis kaj ŝi levis la kovrilon, tiel ke ĉiaj teruraĵoj eliris kaj trafis la homaron katastrofe. Ŝi tamen sukcesis fermi ĝin por ke ne elflugu ankaŭ la lasta afero, kiu kuŝis ĉe la fundo: La Espero. Nome, kiam ĉio malaperas restas nur la Espero. Sed, kvazaŭ tio ne sufiĉus, Pandora plue scvivolis kaj refoje malfermis la skatolon, tiel ke ankaŭ La Espero fine malaperis el la mondo. Trista rakonto, ĉu ne?

Bedaŭrinde, la mondo nun refoje troviĝas en tiu stato. La skatolo jam estis malfermita, tiom da malbonoj jam okazadas. Ni vivas ĉiutage kun timo ke iu refoje malfermos la damnitan donacon de dioj kie postrestis la lasta espereto, nia lasta ŝanco. Jam fisvarmas diversaj malfermemuloj ĉe la kovrilo. Ĉu ĝi eltenos?

Zamenhof ankaŭ tre konsciis ke la plej granda malbono den la homaro estas Malamo, kiu plej ofte venas el miskompreno aŭ nekompreno. Malamo ekzistas por forpreni esperojn, dum espero ekzistas por certigi la futuron, la ideon ke la morgaŭo venos. Espero estas kredo je vivo, dum malamo malas al ĉio pluvivema. Espero kreas, malamo detruas. Espero vivigas, malamo mortigas. La espero do fundamentas.

Zamenhof kreis ilon por malhelpi la malbonon. Li kredis ke gravas la Vojo almenaŭ same kiel la Celo, ke esencas la komunikado: la homa kontakto. Tial li kreis lingvon por redoni ŝancon al la perdita espero de Pandora. Ne hazarde li elektis sian pseŭdonimon, d-ro Esperanto, ne hazarde la lingvo kvazaŭ nature prenis sian nomon de la espero. Espero kiel kuracilo, kiel resaniga eliksiro.

Li ankaŭ bone travidis la duoblan funkcion de homaj lingvoj. Unuflanke lingvo ligas nin kun aliaj homoj, pro kio eblas atingi ĉion kion homoj ili ekdeziras fari, dum ili havas komunan parolon. Aliflanke, lingvo ankaŭ disigas nin de aliaj homoj aliparolaj, kaj se ne eblas komuniki la homaro perdas sian venkan kapablon kontraŭ la obstakloj.

Lingvo estas samtempe kaj ligilo kaj katenilo. (Ankaŭ katenoj havas tiujn du facetojn, ili ne nur kunligas sed ankaŭ malliberigas). Lingvo ligas nin kun nia propra grupo sed forŝlosas de ĉiuj aliaj, do disde la resto de la homaro. Jen do la paradokso de lingva komunikado homara; ke lingvoj ankaŭ malunuigas.

La solvo kun la t.n. *mondolingvoj* estas nur trompa: ni povas ja komuniki kun la aliaj per idiomo de iu grupo kiu altrudis sian lingvon samtempe kun sia potenco. Ekzemple, eĉ se ni ĉiuj parolus la anglan kiel la duan lingvon, ni ankoraŭ restas forŝlositaj de la uzantoj de la franca, germana, rusa, ĉina, araba, evenka aŭ bengala … Samtempe la potencantoj, usonanoj, angloj, kanadanoj k.s., ne lernas niajn lingvojn; do tute ne ekzistas reciprokeco, kiel en la kazo kiam ni komunikas ene de propra lingvujo. Fakte komunikado ne vere ekzistas dum ĝi estas unudirekta. Ni ne vere ***inter****parolas*. Komunikado per la angla aŭ rusa (aŭ simile) ne interproksimigas homojn kaj popolojn, nur ilas por dominigi la kulturon kaj potencon de la «mastraj» nacioj. Ili parolas al ni, sed ne aŭskultas nin. Ili ne povas aŭdi nin ĉar ili ne komprenas kion ni diras. Niaj lingvoj ne valoras, aŭ nur loke limigite aplikiĝas. Ilia lingvo unuigas: sed unuigas nin kun Ili, kaj ne vere interunuigas en digna reciproko. Afero de akcento, eble, sed home tre grava.

Alia afero estis la neŭtrala Latino en mezepoko kaj renesanco: ĝi estis la lingvo de «majstroj» ne de «mastroj». Dum la ekspando de la Romia Imperio estis malsame: la ŝtata imperiismo disvastigis sian lingvon kaj tiuj kiuj lingve latiniĝis (aŭ heleniĝis, en la oriento)



Desegnis pentristo Nenad Opačić

fariĝis romianoj, do ĉesis esti iliroj,gaŭloj, etruskoj aŭ iberoj. Similaj procezoj okazadis dum aliaj imperiaj ekspandoj: araba, ĉina, persa, hinda, rusa, inkaa k.s. La rezulto estis do asimilado al la pli forta. Tio almenaŭ koncernas la elitojn, ĉiam kredante (ne senbaze) ke nur tiu tavolo gravas. Ekzistas tamen kelkaj bonaj ekzemploj de disvastigo de diversaj kontaktlingvoj, kiel la malaja, svahila, evenka, sabira, ĉinuka k.s., kie la rilato baziĝis je komerca interŝanĝo kaj reciproka bezono, pro kio ne suferis la lingvoj de lokaj komunumoj kaj kulturoj, kiuj daŭre restis uzataj.

Ion tian celis, do, Zamenhof, ke la homaro denove havu unu aŭtentike neŭtralan lingvon, pure ligan, tute ne malligan; plene konektan, neniel malkonektan. Tia lingvo povus redoni al ni la Esperon por povi reatingi tiun staton de la homaro kiam nenio plu staros sur la vojo se ni ekdeziros tuŝi la ĉielon aŭ eĉ stelojn. Dum ni uzas 7000 diversajn kodojn, tio ne eblas. Kaj se ni ĉiuj parolas lingvon de unu grupo, kiu nin tiel perlingve mastras, ni neniam estos vere liberaj nek plene siaj. La plimulto nun povas internacii nur per lingvoj fremdaj. Kaj se ni restas fremdaj al ni mem, kiel ni tiam plu memus? Jen la Faŭsta dilemo: enmondi kiel fremdulo, aŭ ekstermondi estante si mem? Integriĝi kun la tuto perdante la propran karakteron, aŭ izoliĝi provante resti kio vi estas? (Ĉu eblas entute esti io kio vi ne estas? Tiaj dilemoj ne aperas ĉe denaskuloj de la domina lingvo. Imperiaj lingvoj estas partoj de la imperia sistemo mem. Kiu tion forgesas, tiu estas naiva. Se ni volas krei malimperian mondon, ne de konkuraj nacioj, sed de liberaj kreaj individuoj, ni devos ankaŭ opcii por neimperia lingva esprimilo.

Ene de naciaj lingvujoj kutime estas tiel ke iu lingvo estas komuna al la plimulto, kaj tamen preskaŭ ĉiam restas iuj lingvaj minoritatoj, kiuj devas lerni la dominan lingvon por plenrajte partopreni kun la ceteraj. Lerni plene fremdan lingvon estas malrapida, mafacila kaj ofte ne tre sukcesa projekto: membroj de la minoritato havas fremdan akĉenton, faras erarojn, ofte estas ridindigataj, kaj cetere pli malsukcesaj en la vivo. La majoritato do ĉiam posedos la avantaĝon de denaskuloj en la domina lingvo. Plej ofte ili ne lernas la minoritatan lingvon nek interesiĝas pri iliaj kulturo aŭ vivo.

Nuntempe, kun la globaligo perangla, la mondo alvenis en strangan situacion, kie praktike ĉiuj, krom la denaskaj anglalingvanoj, fariĝis minoritato. Eĉ grandaj nacioj kaj lingvogrupoj, ĉinoj, rusoj, hispanaŭ franclingvanoj, japanoj kaj germanoj, araboj kaj svahilanoj, koreoj kaj ajmaroj, estas lingva minoritato kiu ne povas plenrajte kaj samrange partopreni la internacian vivon, krom tra la imperia lingvo, kiun tamen la plimulto neniam sukcesas bone lerni. Ni ĉiuj estas do la minoritato, ĉar de tia diskriminacio suferas eĉ la anglalingvanoj mem, kies lingva politiko orientiĝas al divastigado de propra kulturo kaj tiel ili mem kulture malriĉiĝas, mapli facile lernas koni aliajn mondojn ol la propra.

Do, ni ĉiuj estas minoritato iusence. Zamenhof mem apartenis al minoritata kaj malaprezata popolo: li estis orienteŭropa judo. Tio difinis lian vivon, ĉar kiel minoritato, kaj ĉefe kiel judo tiam kaj tie, lia mondpercepto estis alia ol tiu de la ĉirkaŭaj rusoj, poloj, belorusoj, germanoj aŭ litovoj. Kiel juna homo li unue serĉis la solvon por sia malfeliĉa popolo, klopodis normigi la jidan lingvon, kiun oni tiam nomis 'ĵargono', kaj kiun eĉ propraj parolantoj malestimis, aliĝadis al diversaj cionismaj movadoj, planis elmigradon al Palestino, Ugando, Madagaskaro, Usono … Sed fine li rezignis pri tio kaj aliris la problemon el pli ĝenerala, pli homarana vidpunkto.

Zamenhof komprenis ke la problemo ne estis ke iu estas judo, ruso aŭ polo sed ke temas pri malegaleco kaj diskriminacio, kaj ĉiam pri manko de kontakto kaj kompreno. Li konsciis ankaŭ pri la religia diverseco kaj interkonfesia malamikeco, tial li poste proponis ankaŭ religian projekton nomatan hilelismo, poste homaranismo. Lia mondkoncepto enhavis do tri pilonojn: komuna helplingvo etne neŭtrala, malsekta religio sendogma kaj frata traktado interpopola. Ĉio kune, temis pri relative kompleta etika sistemo, en kiu la lingvo ludis pure instrumentan rolon.

Tamen nur tiu elemento ricevis amasan subtenon kaj havis sukcesan 130 jaran postvivon. Ĉe la fino de sia vivo, meze de la mondmilito, li ankaŭ sendis sian Leteron al Diplomatoj, faman inter la esperantistoj sed nemeritite nekonatan en la ekstermovadujo. En tiu letero li ne nur proponas la etikan principaron kiel fini kaj eviti militojn sed eĉ skizas planon de vasta popola federacio, kiu fakte multe similas al la poste evoluinta Eŭropa Unio.

Zamhof do vivis en la 19-a kaj mortis en la 20 jarcento, sed li agis por ni, la homoj de lia futuro. Tial li ne estas ia figuro de nia pasinto. Li daŭre komunikas kun ni, ne nur per sia lingvo sed ankaŭ tra siaj ideoj, kiuj ankoraŭ ne realiĝis. Ĉiam kiam ni sincere volos pli belan kaj pli bonan mondon ni devas repensi pri tiu granda viziulo, homo de nia hodiaŭo kaj homo de nia venonto.

Nikola Rašić

[1] En Varsovio 14-an de aprilo 1917, mortis Lejzer Ludwig Markovič Zamenhof, la iniciatinto de Esperanto.

[2] Helene Προμηθεύς [prometheús] «anticipe /pri/pensanta»

[3] Helene Ἐπιμηθεύς [epimethéús] (poste /pri/pensanta)

[4] Pandora (helene «ĉiondona»).

AGADO DE KROATAJ ESPERANTISTOJ EN LA JARO 2017
- la jaro de la centa jubileo de la morto de Zamenhof -

L.L. Zamenhof
Bjalistoko 1859 – Varsovio 1917

Hrvatsko povjerenstvo za UNESCO
Croatian Commission for UNESCO
Commision croate pour l'UNESCO

United Nations
Educational, Scientific and
Cultural Organization

Organisation
des Nationes Unies
pour l' education
la science et la culture

Publikaj programoj sub aŭspicio de Kroata komisiono de UNESCO.

Kroata Esperanto-Ligo klopodas en 2017 enirigi Esperanton en la kroatan nacian liston de nemateriaj kulturaj heredaĵoj.

Noto: *Enkonduko al la jubilea jaro 2017 okazis per festado de Zamenhof-tago la 15an de decembro 2017, kiam festparolis hungara ambasadoro György Nanovfszky en Hungara kultura asocio Ady Endre, en Zagreb, Martićeva 12.*

Januaro

En Bjelovar daŭras preparoj por la internacia aranĝo *Kultura kunfandiĝo de la multetna Eŭropo*
En Teherano Achtar Etemadi tradukas infanlibron *Pirgo* de Anđelka Martić el Esperanto persen.
(La esperantigintoj **:** Josipa Katunar kaj Josip Pleadin)
En Los Angeles Sebastian Schulman preparas anglan tradukon de *Kroata milita noklibro* de Spomenka Štimec.
En Italio Carlo Minnaja kaj Giulio Cappa preparas italan tradukon de *Ombro sur interna pejzaĝo* de S. Štimec
5.1. en Varaždin Siniša Horvat (laŭ iniciato de Srećko Radulović) okazigis enkondukan lecionon al Esperanto-kurso.
10.1. La gazeto *Regionalni tjednik* Varaždin publikigis intervjuon kun Spomenka Štimec pri ŝia Esperanto-agado.
27.1. En la biblioteko *Bogdan Ogrizović Zagreb* estis prezentita la libro *Dom u Srednjoj Europi* de Spomenka Štimec, prozo plej parte tradukita el la esperantlingvaj libroj de la aŭtorino. Pri la verko parolis Jasminka Domaš, Judita Rey Hudeček, Božidar Brezinščak Bagola kaj la aŭtorino.

31.1. HTV sian elsendon *Nota o jeziku* dediĉis al Esperanto. Parolis d-ro Velimir Piškorec kaj kantis Neven Mrzlečki.
En la decembra numero de la revuo *Hrvatsko Zagorje* aperis vojaĝprozo de Božidar Brezinščak Bagola *Kongres u Nitri* kaj recenzo de Vlasta Horvatić-Gmaz pri la libro *Dom u Srednjoj Europi* de Spomenka Štimec.

Februaro

2.2. D-ro Vytenis Andriukaitis, komisiito pri la sano kaj sekureco de manĝaĵoj ĉe Eŭropa Konsilio (kaj esperantisto) gastprelegis en la kroata sidejo de Eŭropa Komisiono en Zagrebo. La oficistoj enmanigis al li la kroatan tradukon de lia prelego en Nitra. La prelegon kroatigis Božidar Brezinščak Bagola.
12. 2. La gazeto *Glas koncila* publikigis artikolon *Rakontoj de esperantlingva aŭtorino* pri la libro de Spomenka Štimec.
19. 2. Esperanto-Societo Split jarkunvenis.
23.2. Judita Rey Hudeček okazigis TV-filmadon pri Esperanto en la ejoj de Kroata Esperanto-Ligo por la elsendo *Dobro jutro, Hrvatska!* Parolis Judita Rey Hudeček, Zlatko Tišljar kaj Anto Mlinar.
24.2. En la ejoj de Komunumo Bedekovčina estis prezentita la revuo *Hrvatsko zagorje 4/12* en kiu aperis la kroataj tradukoj el Esperanto de aforismoj de Georgo Handzlik el la libro *Verdeskaj pensoj*.
Voĉlegis la tradukinto Božidar Brezinščak Bagola. Ĉeestis interalie la reprezentanto de la Pola ambasadejo en Kroatio Slaven Kale.
25.2. En la tombejo de Makarska estis entombigita esperantisto Ivo Puharić.
26. 2. Bjelovaraj esperantistoj jarkunvenis.
La revuo *Republika (1-2)* publikigis vojaĝprozon de Božidar Brezinščak Bagola *Kongres u Nitri.*
Judita Rey Hudeček ekgvidis Esperanto-kurson por membroj de Kroata-Makedona Societo.

Marto

8.3. Neven Kovačić prelegis en Esperanto-Societo *Tibor Sekelj* pri etaj eŭropaj ŝtatoj Vatikano, Monako, Andoro, Luksemburgo, Malto kaj Liĥtenŝtejno .
15.3. La interneta revuo *Zvona i nari* el Ližnjan publikigis la kroatan tradukon de la prelego el Nitra de Vytenis Andriukaitis *Višejezičnost u Europskoj uniji.*
Esperanto Societo Rijeka eldonis sian Informilon por 2017 kaj anoncis la 110an jubileon de Esperanto en Rijeka festota de la 28a ĝis la 30a de septembro 2017.
En Sao Paolo aperis la dua portugala eldono de la lernolibro pri Esperanto laŭ la Zagreba Metodo.

Aprilo

8.4. Judita Rey Hudeček aranĝis gastadon de esperantistoj en la populara radio elsendo *Putujemo Hrvatskom.* Pri Esperanto parolis Judita Rey Hudeček, Zlatko Tišljar kaj David Rey Hudeček
10.4. Mihaela Cik aranĝis TV-filmadon pri SEK por TV-Student. Oni intervjuis Mihaela Cik kaj Dalibor Šeatović.
13.4. HRT, La unua programo de Kroata Radio en la elsendo *Hrvatima izvan domovine* intervjuis Spomenka-n Štimec renkonte al la 14a de aprilo, la centa jubileo de la morto de L.L. Zamenhof.
Božidar Brezinščak Bagola publikigis sian vojaĝprozon

Kongres u Nitri en *Štajerske novice.*
14.4. Okaze de la morto-tago de Zamenhof TV-kalendar elsendis programon pri Zamenhof.
14.4. Okaze de la mortotago de Zamenhof junaj esperantistoj pendigis banderolon kun la vorto „Esperanto“ ĉe la fenestroj de la nova ejo en Vodnikova 9 (Prizorgis la teamo : Biba Rožić-Šutej, Mihaela Cik, Robert Milijaš)
14.4. Okaze de la mortotago de Zamenhof Kroata Radio, Radio Sljeme intervjuis Spomenka-n Štimec por la elsendo CroAsan.
14.4. Neven Kovačić prelegis pri Esperanto por la klubanoj de *40+*
22.4. Dudek kvin kroataj esperantistoj partoprenis en Brežice en Slovenio programon honore al la centa jubileo de la morto de Zamenhof.
25.4. En Hum na Sutli Spomenka Štimec ricevis literaturan premion *Rikard Jorgovanić* por sia priesperanta libro *Dom u Srednjoj Europi.*

Fotis Andrzej Suchacki

27-30.4. En Varsovio okazis konferenco honore al la centa jubileo de la morto de Zamenhof.
Spomenka Štimec iniciatis legadon de fragmentoj el la libro Zamenhof-Strato de Roman Dobrzyński en la varsovia Zamenhof-Strato. La programon gastigis Muzeo pri juda kulturo POLIN. Ŝi voĉlegis la kroatan fragmenton en la traduko de Domagoj Vidović kaj kontribuis al la aranĝo per prelego pri sia verkado en Esperanto.
La revuo *Literatura Foiro, aprilo 2017* publikigis fragmenton el kroatlingva romano *Dobro došla košava* de Božidar Brezinščak Bagola en la esperanta traduko de Zlatoje Martinov.
Judita Rey Hudeček publikigis tripaĝan artikolon pri Esperanto en la luksa revuo *Zagreb, moj grad*.
Esperanto-Muzeo en Ŝimonoseki en Japanio transprenis de la familio Mori la preskaŭ 50-jaran korespondadon de Spomenka Štimec kun la japana esperantisto Mori Singo.

Majo

5.5. Biblioteko *Bogdan Ogrizović* en Zagreb gastigis la programon *Esperantski spomenar* organizitan de Judita Rey Hudeček
5.5. La kroata literaturo kaj Esperanto estis la titolo de la prelego de Spomenka Štimec en Biblioteko Travno. Organizis Vesna Radošević.
20.5. Kroata Esperanto-Ligo jarkunvenis
25.5. Muzik-literatura programo „Zamenhofova ulica“ u Zamenhofovoj ulici („La Zamenhof-strato“ en la Zamenhof-strato) estis okazigita en la korto de Art-akademio en la zagreba Zamenhof-Strato. Muzikis Neven Mrzlečki. Koncertis per perkutinstrumentoj Kaja Farszky kaj Nenad Sinkauz. Voĉlegis el la libro *Zamenhof-Strato* en la kroata Domagoj Vidović, en la pola Malgorzata Muić, en Esperanto Mihaela Cik, en la japana la kulturateŝeo de la japana ambasadejo en Kroatio Ryohei Nakajima, en la hungara Zsuzsa Varga, en la ĉeha K. Novoselec, en la slovaka Jozef Mikula. La programon gvidis Đivo Pulitika.
La korto de la Akademio estis ornamita per banderolo kun la vorto *Esperanto*.

La korto de la Akademio. Fotis Ivan Špoljarec

25.5. Božidar Brezinščak Bagola estis intervjuita de Hrvatski radio, Radio Sljeme, la elsendo Kajkaviana. Dum la 90-minuta intervjuo, li parolis interalie pri sia Esperanto-agado.
27.5. Okaze de Tago de meteorito en Hrašćina Esperanto-Societo Trixini kunlabore kun KEL prezentis kroatlingvan *Enciklopedion de Hrvatsko zagorje* (en tiu regiona enciklopedio aperis ankaŭ artikoloj pri esperantistoj Bedeković, Balagović, Štimec) Parolis prof. Jasmina Lukec el la nacia enciklopedia eldonejo *Leksikografski zavod Miroslav Krleža.*
Muzikis ensemblo Kušlec el Konjščina. Pri la libro de Spomenka Štimec Dom u Srednjoj Europi parolis Judita Rey Hudeček.
Intervjuoj ĉe Radio Zlatar, Radio Marija Bistrica kaj Radio Kaj.
Jelena Lončarević partoprenis Renkontiĝon de poliglotoj en Bratislava de la 31a de majo ĝis la 6a de junio.
En Bjelovar aperis La dua bulteno pri Inter-fest.

Junio

Zlatko Tišljar kaj Siniša Dvornik partoprenis Germanan Esperanto-Kongreson en Freiburg kaj agis en la jarasembleo de Eŭropa Esperanto-Unio la 4an de junio 2017.
Ses kroataj kaj unu franca esperantisto partoprenis unusemajnan studvojaĝon tra Makedonio kaj renkontiĝis kun la makedonaj esperantistoj en Prilep.

INTERFEST invitas aŭguste al Bjelovar!

Ekzistas urbo en nia lando, kiu Esperanton tenas en sia koro ekde 1909 ... Multaj generacioj de esperantistoj kaj urbanoj klopodis dum pli ol unu jarcento teksi la revon de Zamenhof. En tiu urbo nun funkcias tre entuziasma grupo da aktivuloj, kiu por vi (jes: por vi, esperantistoj de Kroatio kaj ĉiuj aliaj landoj!) organizas la **internacian festivalon INTER-FEST!** En tiu laboro la membroj de la Loka festivala komitato kunigis ĉiujn fortojn kaj sukcesis stimuli gravegajn urbajn kaj departementajn institucionjn kaj gvidantojn por ricevi ilian senrezervan apogon: moralan, organizan, financan kaj ĉian alian! Des pli: ili kunigis kvar kroatiajn societojn en la plenumo de tiu tasko! Ĉu la esperantistoj de Kroatio faros la samon kaj subtenos la bjelovarajn klopodojn? Ĉu la movadanoj el la najbaraj landoj opinios, ke ni bezonas regionan aranĝon kun translima kunlaboro? La aranĝon, kiu estonte estu nia kultura kultivejo kaj kunvenejo, nia forta atuto kontraŭ ĉiam pli ofte aŭdataj argumentoj, ke Esperanto ne plu vivas! Aŭ oni prezentos tiun ideon kaj klopodojn nur kiel "ŝatatan ĉevaleton" de kelkaj lokaj entuziasmuloj?

La regiono, en kiu okazos INTER-FEST, estas unu el la plej gravaj vartejoj de Esperanto en Kroatio. Tia ĝi estis ĉe la komenco de nia enlanda movado, tra la periodo inter la du mondmilitoj, en la socialisma Jugoslavio kaj nun, en la sendependa Kroatio kaj nia komuna Eŭropo! Bjelovar estas la centro de tiu regiono favorega al Esperanto, senkonsidere pri la politikaj ŝanĝoj kaj ekonomiaj malfacilaĵoj. Kun la sama entuziasmo la esperantistojn subtenis la antaŭa urbestro de Bjelovar **Antun Korušec**, kiel la novelektita **Dario Hrebak**, kiu la delegacion de INTER-FEST akceptis la 20-an de junio, mallonge post sia elektiĝo kaj ekofico.

Ni scias, ke ni vivas en malfacila tempo por Esperanto, kaj des pli la laboro de la entuziasmaj esperantistoj en Bjelovar estas estiminda kaj subteninda! Ni ne forgesu, ke ĉi jare nia lingvo **Esperanto fariĝis 130-jara** (koincide: ankaŭ la loka kultur-arta societo "Golub" estas samaĝa, kaj havas interesan historion teksitan de esperantisoj!). Ni ne forgesu, ke ĉi jare ni omaĝas **Zamenhofon okaze de lia 100-a mortodatreveno**, kion subtenas **UNESKO**, la organizo kun kiu la monda organizaĵo de esperantistoj (UEA) havas proksimajn kunlaborrilatojn! Ni rememoru, ke tiujn rilatojn sukcese konstruis en 1954 en Montevideo la kroata motoro de UEA: **Ivo Lapenna** el Split, kiun en Bjelovar ni omaĝas per lia scienca verkego pri internacia juro. Apero de sciencaj libroj, kaj des pli

Esperantistoj ĉe la urbestro de Bjelovar Dario Hrebak

tiaj, kiajn ni prezentos en Bjelovar, ne estas ofta. Krom Lapenna, ni prezentos ankoraŭ unu epokfaran eldonon: la 3200-paĝan! medicinan vortaregon de **Jozo Marević**, kaj ĉion ĉi kun partopreno de medicinistoj kaj juristoj de la regiono! Kaj ne mapli gravas, ke dum INTER-FEST ni prezentos la Esperantan tradukon de la perlo de moderna kroata literaturo, la furoran romanon de **Kristian Novak "La nigra patrino tero"**. Ni ne forgesu, ke ĉefe per la klopodoj de Dokumenta Esperanto-Centro en la sama regiono, Kroatio atingis la rangon de unu el la plej fekundaj eldonaj nacioj lastatempe en Esperantujo!

Estas la ĝusta momento por mobilizi ĉiujn movadajn fortojn, por subteni la klopodojn de tiuj, kiuj kuraĝis fari la neimageblan aferon ... kiuj arogis en la malgranda urbo organizi internacian aranĝon unuafoje en la jarcenton longa historio de la loka Esperanto-societo! En sia cirkulero, kiun multaj el vi jam ricevis kaj helpis plusendi al aliaj, pri tio jam tre emocie skribis la nuna prezidanto de KEL, Anto Mlinar, al kiu ni volas publike danki pro la ago, kiu gvidas al konstruado kaj pifortigo de nia landa organizaĵo.

Ni do ripetas liajn vortojn: **NI ĈIUJ KUNVENU EN BJELOVAR** ĉi aŭguste!

Se nun ni preterlasas tiun eblecon, verŝajne ni atendos multajn jarojn por aranĝi ion similan! Male, se ni akceptas la gastamon de Bjelovar, ni ankoraŭ pli larĝe malfermos la pordon por niaj estontaj aktivecoj kaj pluportas la torĉon de Esperanto en tiu urbo! Tiukaze eble ne estas fantazio esperi, ke ankaŭ Kroatio havos aranĝon, al kiu diverslandaj esperantistoj volonte venados.

La organizantoj por vi preparis abundan programon, kiun vi povas vidi en la propra retejo de la Festivalo: ***http://www.esperanto-bjelovar.hr/festival/esperanto.html***

Ekzistas ankaŭ **speciala oferto** por tiuj, kiuj la Festivalon povas partopreni nur dum du tagoj, kiam la programo estas plej densa (**la 5-an kaj 6-an de aŭgusto**). Eble interesas vin iu el la multaj programeroj, **ekspozicioj, koncertoj, libroprezentoj, ekskursoj** ... Eble la **Interkona vespero**, kiu celas kunvenigi malnovajn amikojn kaj prezenti al vi tute novajn ... Eble vi ŝatas **neformale pikniki** aŭ **ekskursi** kun ni al kelkaj belaj lokoj de niaj regiono kaj lando. Vi mem decidu, kaj skribu al ni pri viaj planoj kaj deziroj!

Kiel jam multfoje ĝis nun, la esperantistoj de Bjelovar bonvenigos vin en sia urbo!

Nia kontaktadreso:

esperanto.bjelovar@gmail.com

ESPERANTO-KONFERENCO de ALP-ADRIO

La 22-23an de aprilo 2017 okazis en **Brežice**, ĉelima pitoreska slovenia urbeto, **19-a Esperanto – konferenco de ALP-ADRIO**. La a 22-an de aprilo okazis la konferenco kun la temo: **130 jaroj de E Movado, 100 jariĝo de Ludoviko Lazaro Zamenhof kaj Alp-Adriaj regionoj**. Krom slovenaj kaj italaj esperantistoj, kiuj preparis **la** tutan konferencon**,** al Brežice venis ankaŭ dudekkvin esperantistoj el **Kroatio**.

Enkonduke la prezidanto de Slovenia Esperanto-Ligo **Janez Zadravec** prelegis pri la temo: 130 jaroj de Esperanto-movado. Kadre de tiu temo parolis ankaŭ reprezentantoj de **la** itala (**Edvige Ackerman**) kaj kroata (**Anto Mlinar**) movadoj. Ĉiuj el ili akcentis la plej grandajn sukcesojn kaj malsukcesojn de siaj landaj Esperanto-movadoj. Montriĝis tamen ke inter tiuj du flankoj ekzistis preskaŭ ĉiam la tuŝpunktoj.

Sekvis la prelegoj de **Elda Doerfler** kaj **Edvige Ackerman** pri la temo: **Antaŭ 100 jaroj forpasis Ludoviko Lazaro Zamenhof.** La temon**: Alp-Adria Regiono kaj ESPERANTO** prezentis **Edvige Ackerman**. **Elda Doerfler** akompanis sian prelegon per multaj interesaj dokumentoj kaj fotoj pri la lasta parto de la vivo de Doktoro Zamenhof kaj reeĥoj de lia forpaso.

Post komuna lunĉo ĉe la konferenceja salono la partoprenantoj diskutis pri la ĉefaj temoj. **Vjekoslav Morankić** parolis pri la eblecoj de landaj asocioj postuli de aŭtoritatoj en siaj landoj proklami Esperanton la nemateria kultura heredaĵo, simile al Pollando kiu tion jam efektivigis kaj **Kroatio** kiu provas tion fari.

Janez Zadravec en sia diskuto proponas ke esperantistoj ĉeestu grandajn eventojn kiujn organizas unuopaj landaj asocioj kiel internaciajn renkontiĝojn kaj estu tie aparte videblaj kaj aŭdeblaj ankaŭ por ekstera, neesperantista publiko. **Josip Pleadin** je la nomo de Bjelovara esperantista societo invitis ĉiujn partopreni la internacian kulturan festivalon **INTER-FEST** ĉi-somere en **Bjelovar**. Oni diskutis ankaŭ pri la estonteco de Alp-Adriaj konferencoj. **Pleadin** anoncis ke li provos kun la bjelovara societo, se ĝi tion akceptos, organizi la sekvontan 20-an konferencon kadre de Inter-fest 2018. Eble tiam en ĝi partoprenus ankaŭ aŭstroj kaj hungaroj kio mankis en kelkaj lastaj konferencoj.

La diskuton finis **D-ro Jozo Marević** kiu prezentis sian proprainiciate preparitan kaj eldonitan libron: **Oklingva medicina enciklopedia vortaro**, Latinum-English-Français-Deutsch-Español-Esperanto-Hrvatski. Temas pri la plej granda Esperanto-libro: ĝi havas 3148 paĝojn kaj pezas ĉirkaŭ 4,5 kg. Nekredeble!

Posttagmeze ni promenis tra la malnova parto de Brežice kaj vespere ĉe komuna vespermanĝo ni ĝuis la kultur-amuzan programon kun kantkoruso, recitaĵoj kaj dancmuziko. Por bona organizo ni dankas aparte al la geedza paro **Anton** kaj **Reneja Mihalič.**

Anto Mlinar

Vodnikova 9 nia estonta ejo

851. Vera Roknić	13,50 eŭroj
852. Zlata Nanić	67,56 eŭroj
853. Željko Gubijan	33,78 eŭroj
854. Teodor Mikić	40,54 eŭroj
855. Jelena Lončarević	20,27 eŭroj
856. Olga Štajdohar-Pađen	54,05 eŭroj
857. Spomenka Štimec	60,81 eŭroj
858. Damir Mikuličić	81,05 eŭroj
858. Davor Klobučar	196,16 eŭroj
859. Mladenka Đaković	40,54 eŭroj
860. Đivo Pulitika	54,05 eŭroj
861. Božidar Brezinščak Bagola	40,54 eŭroj
862. Anto Mlinar	54,05 eŭroj
863. Anonima	81,08 eŭroj
864. Marija Kvakić	2,70 eŭroj
865. Zlatko Tišljar	50,67 eŭroj
Sume:	**891,21 eŭroj**

Inter novembro 2016 kaj junio 2017 niaj membroj kolektis por Vodnikova 891,21 eŭrojn. Ekde la jaro 2003 ni kolektis inter niaj membroj kaj amikoj 49.287,57 eŭrojn.

Nia lasta kredito al Esperanto-Societo Trixini en junio 2017 estas 9.699,02 eŭroj, kaj nia monata partopago laŭ la kontrakto estas 181,47 eŭroj .

Dankon al la membroj kiuj helpis al ni havi propran Esperantejon en Zagrebo!

Nia bankonumero en Raiffeisenbanko: Hrvatski savez za esperanto IBAN HR6124840081100881157. Modelo 00

En niaj ejoj daŭre loĝas subluantoj, helpantaj al niaj financoj.

La oficejo de la urbestro akceptis nian peton kaj subtenis KEL per unufoja helpo de 10.000 kn por aktivigo de junaj homoj en celebrado de la centa jubileo de la morto de Zamenhof. Per parto de la subvencio gejunuloj farbos la trabojn en la subtegmenta deponejo por la arkivejo kiun ni planas starigi en la monatoj venontaj.

Dum la someraj monatoj ni planas farbigi unu ĉambron kaj loki tien aŭtune la unuan parton de nia Esperanto-biblioteko.



LA 83-A INTERNACIA KONGRESO DE BLINDAJ ESPERANTISTOJ

En la Delegacio de Kroata unuiĝo de nevidantaj esperantistoj (KUNE) en la ĉi-jara kongresurbeto **Sokobanja** (**Serbio**) konsistos nur el la duopo **Dragan Štoković** kaj **Antun Kovač**; la tria membro, studentino **Marija Sentkiralj** kun akompanantino pro ekzameno ne povos partopreni kaj ŝi devis rifuzi la subvencion de Esperanto-Societo *Trixini* por 2017.

Sokobanja estas termobaneja urbeto situanta en la centro de sudorienta **Serbio**. En la jaro 2017 ĝi festas 180 jarojn da turismo.

IKBE83 okazos dum la 8-15 de julio 2017 en la hotelo *Moravica*, kaj organizantoj de la kongreso estas kune Orbis Pictus de **Višnja** Branković kaj Estraro de Ligo internacia de blindaj Esperantistoj (LIBE).

Rolo de la ŝatokupoj en la vivo de nevidantoj estas ĉefa kongresa temo. Via raportanto ankaŭ preparas mallongan referaĵon.

Dum la kongreso okazos elektoj kaj LIBE havos novan Estraron, post la organizata balotado.

Kongresaj ekskursoj gvidos al **Sokobanja** kaj al **Niš**. Okazos ŝakmatĉo inter la kongresa ŝakteamo kaj la ŝakklubo *Svitanja* el urbo Niš.

La kvara kongresa komuniko informas: „regula gasto de „hotel Moravica“ estis la jugoslavia nobelpremiito, verkisto **Ivo Andrić** kaj li tie en „sia“ apartamento 144 verkis du rakontojn kaj komencis la romanon *Ponto super Drina*, por kiu li en 1961 ricevis la Nobel-premion. En la apartamento estas instalita ekspozicio de liaj personaj aĵoj, kiujn li tie uzis.

La dua elstara gasto de **Sokobanja** estis fama serba verkisto de komedioj **Branislav Nušić.** Oni diras, ke li lanĉis la frazon:

Sokobanja, Soko grad – dodješ star, odeš mlad! (Urbo falka, akvo varmas – maljunulon juna faras.)

Antun Kovač

La 69-a **Internacia Fervojista Kongreso** okazis en Colmar

Inter la 16-a kaj 23-a de majo 2017 en **Colmar** en **Francio** en la regiono Alzaco okazis la 69-a kongreso de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF) en kunlaboro kun Tutmonda Asocio de Konstruistaj Esperantistoj (TAKE) kaj kelkaj francaj E-organizoj (Franca Fervojista Esperanto-Asocio – FFEA, Espéranto France-Est kaj Moulhouse-Esperanto). Entute partoprenis 145 gekongresanoj. El **Kroatio** la kongreson partoprenis membro de Kroata Fervojista Esperanto-Asocio, **Zlatko Hinšt**, salutinta nome de KFEA.

Tuta programo en malfermitaj spacoj okazadis en eksa dominikana monaĥejo. Dum la kongreso okazis laboro de Faka komisiono. Precipe estis gravaj fakaj prelegoj. Ĉefaj prelegoj de francoj, ekzemple de **Laurent Vignaud** *Dekstraflanka trafiko en Francio* kaj de **Pierre Grollemund** *La Stacidomo de Colmar* (aperigita kiel artikolo en jara revuo/kajero de TAKE 2017 „Konstruado“). Ankaŭ okazis prelegoj sub titoloj *Studo pri informa sistemo de internacia intergriĝa loĝistik-administrado fare de Hohhota Fervoja Buroo, Interna Mongolio de Ĉinio“* de **Hongwei Zhang**; *Modernigo de fervoja linio por trajnoj de granda rapideco inter Prago kaj Dresden de* **Ladislav Kovař** kaj *Prelego pri san-administrado por fervojistoj* de ***Wieslaw Libner***. Geedzoj **Lene** kaj **Jan Niemann** faris du prezentaĵojn, L. N. pri *projekto de publika transporto en la dana urbo Odense, kaj J. N. pri agado de FISAIC (esperantlingve* Federacio de Artaj kaj Kulturflegantaj Fervojistaj Asocioj). **Zlatko Hinšt** prezentis sian prelegon **Ĉefa Stacidomo Zagreb kiel fervoja centro en Kroatio** pri la koncerna trafiko de trajnoj. La pritema artikolo aperis en *Konstruado*-kajero de TAKE 2017.

En organizado de Kongreso kaj dum ĝia okazado kun diligentaj francaj gekolegoj el FFEA, precipe aktivis la kasisto de TAKE kaj Kongreso **André Grossmann** kaj **la** prezidantino de IFEF **Rodica Todor**. Unu el la programeroj estis prezentado de la sekva kongreso de IFEF okazonta en **Vroclavo** en **Pollando** en la jaro 2018.

Kongresanoj piedire vizits la urbon **Colmar** sub gvidado de **Edmond Ludwig** dum kiu ili ekkonis mezepokajn domojn konstruitaj surbaze de trabfaka sistemo, kaj aliajn konstruaĵojn en la urba centro kaj proksime de ĝi (katedralon, preĝejojn, muzeojn kiel Unterlinden, Auguste Bartholdi, Hansi,ampleksajn verkojn de konataj lokaj artistoj, t.n. „Malgrandan Venecion“, bazaron de agrikulturistaj produktoj). Li poste ankaŭ bone gvidis ekskursojn dum vizitado de en **Kayserberg**, **Riquewihr**, **Hunawihr** – ĝardeno de vivantaj papilioj, Strasbourg kaj Obernai dum la kongreso, sed ankaŭ dum postkongreso, kaj prelegis pri la regiono **Alzaco**. Krom tio partoprenantoj vizitis Fervojan muzeon „Cité du Train“ en Mulhouse kun pli ol 100 fervojaj veturiloj, kiu estas unu el la plej grandaj tiuspecaj muzeoj de la mondo.

En muzika parto de la programo okazis prezentado de folklora heredaĵo fare de grupo „Vogesia“ de **Colmar**.

Zlatko Hinšt

Kroataj sperantistoj en Makedonio

De la 21a – 27a de junio 2017 tra **Makedonio** vojaĝis makedonoj vivantaj en **Kroatio** kaj membroj de Kroat-makedona asocio. Al tiu grupo aliĝis ankaŭ ses kroataj kaj la franca esperantistino **Françoise Noireau** kun sia violono. Tiu kunlaboro efektiviĝis dank' al **Judita Rey Hudeček,** kiu prezidas Kroat-makedonan societon kaj vicprezidas Kroatan Esperanto-Ligon kaj prezidas Esperanto-Societon *Trixini*. La vojaĝo estis stimula ankaŭ por la renkontitaj lokaj makedonaj esperantistoj, kies Landa Asocio bedaŭrinde aktuale ne funkcias.

Sur la foto: Kroataj esperantistoj renkontiĝis kun esperantistoj en **Prilep**

RIJEKA:**110**-a datreveno

Celebrado de la 110-a datreveno de la unua esperanta societo en Rijeka kaj en Kroatio

La celebrado okazos de la 28-a ĝis la 30-a de septembro 2017 en Rijeka. La organizanto estas Esperanto Societo Rijeka (Blaža Polića 2, HR-51000 Rijeka, retpoŝto: esperanto.rijeka@ri.t-com.hr kaj la reta adreso: www.esperanto.hr/rijecki_kantun.htm).

La 28-an de septembro: Malfermo de Filatela ekspozicio kaj ekspozicio de artopentraĵoj de grupo da pentristoj el la urbeto Matulji. La ekspozicioj estos prezentataj en ejoj de Komunumo de Italoj en Rijeka (itale: Comunita degli Italiani di Fiume) strato Uljarska 1, la 2-a etaĝo.

La 29-an de Septembro: Filatela kaj artpentraĵa ekspozicioj.

Je la 15-a horo: Fotado antaŭ dulingva (kroata kaj esperanta) memortabulo sur fasado de la domo Korzo 18. En tiu domo estis sidejo de la unua esperanta societo en Rijeka (1907). Tiun ĉi memortabulon starigis Urbo Rijeka en la jaro 2007, kaj ĝi estas ZEO (Zamenhof Esperanto Objekto) en la urbo Rijeka.

La 30-an de Septembro: Inter 16-a kaj ĝis la 19-a horo okazos la ĉefa programo de la celebrado (en halo de Komunumo de Italoj en Rijeka):

- Himnoj, la kroata kaj la esperanta
- Solena malfermo, salutparolo de reprezentanto de la Esperanto societo Rijeka, salutparoloj de gastoj.
- Ĉefprelego: Konciza historio de Esperanto-movado en Rijeka kaj Kroatio (en la kroata).
- Aŭtoro Jozo Marević prezentos sian verkon: Granda oklingva medicina vortaro. (Inter la lingvoj estas la kroata kaj Esperanto).
- Dankdiplomoj kaj honoraj atestiloj al membroj de Esperanto - Societo Rijeka pro ilia laboro en la Societo kaj en la esperanta movado.
- En la kultura programo prezentiĝos: Itala kantkoruso "Fratelanza" el Rijeka, folklora kaj kantista grupo el la vilaĝo Žejane (Ĵejane) kie loĝantoj parolas istrio-romanan lingvon kiun ili nomas " la ĵejana lingvo". Operkantisto Neven Mrzlečki kantos en Esperanto, kaj la itala kantisto Emanuele Rovere kantos en Esperanto kaj en la itala.

La solenaĵo finiĝos per *modesta* manĝeto.

Esperantistoj, bonvenon al Rijeka!

1.000.000 da Esperanto lernantoj

Pli ol unu miliono da lernantoj lernas Esperanton per la senpagaj kursoj **Duolingo** en la angla kaj hispana. La fascina numero unu miliono estis superita en junio! Informis la bulteno *Voko el Stirio* por junio 2017 kaj invitis la germanparolantojn aliĝi al la senpaga kurso por germanlingvanoj ĉe Duolingo.

Voko el Stirio

Literatura premio

Literatura premio Rikard Jorgovanić 2017 al Spomenka Štimec

Komunumo **Hum na Sutli** kaj Literatura asocio de **Hrvatsko zagorje** dum la lasta jardeko atribuas literaturan premion portantan la nomon de la kroata verkisto **Rikard Jorgovanić** (1853-1880) kiu naskiĝis en **Mali Tabor** ĉe **Hum na Sutli.** La premio celas honori la plej bonan verkon de eldonistoj el Hrvatsko zagorje por la koncerna jaro. La premion por la eldonaĵoj el 2016 gajnis Spomenka Štimec por sia Esperanto-rilata verko *Dom u Srednjoj Eŭropi/ Hejmo en Mezeŭropo.*

Okaze de la atribuo de la premio en la urba biblioteko la 20an de aprilo en **Hum na Sutli,** ŝi voĉlegis la poemon de **Rikard Jorgovanić,** kiun esperantigis **Mavro** Špicer kaj publikigis en *Kroataj poeziaĵoj* en **Budapeŝto** en 1912. Tiel la malnovstila poemo de **Rikard Jorgovanić** revenis hejmen 137 jarojn post la morto de la aŭtoro, en sia esperanta vesto, kvankam la poeto mortis pli frue ol Esperanto naskiĝis.

Mia kanto

Kaŝata puraĵ' de l' amanto
Florspiro jen estas la kanto
Glorante cin, ĉarmon de l' ter';
Nek tuŝon de l' mano gracia,
Nek kison, ho, buŝo de cia
Atingi, atendas l' esper!

Nur sono fariĝi deziras,
Spegulo de l' ĉarmoj sopiras
Ĝi estu al ci; poste for
Per sunardeg' flamigite
Perei en nokto subite
Simila al brulmeteor'.

Rikard Jorgovanić
Esperantigis Mavro Špicer

Nekrologo

IVO PUHARIĆ
(1926 – 2017)

La 22an de ferbuaro 2017 mortis **Ivo Puharić** en sia 91-jaro. Puharić naskiĝis la 28an de oktobro 1926 en **Puharići** apud **Makarska**. Li estis unu el la plej aĝaj loĝantoj de la urbo **Makarska.** Dum jaroj li pasie disvastigadis sian scion pri olivokultivado. Al olivujo li dediĉis ankaŭ la poemon, *Odo al olivujo* kiu kvarlingve aperis en 1983 en gazeto de Internacia konsilio pri olivokultivado kaj muzikigita ĝi fariĝis populara ĉe olivoleaj produktantoj. Krom la olivarboj en lia vivo la elstaran lokon havis montgrimpado kaj Esperanto. Li ekkonis Esperanton en **Bjelovar** en 1950, lernis la lingvon en **Split** en 1951 kaj entuziasmis pri ĝi dum la tuta vivo. La neforgeseblan etoson lasis al juna **Puharić** la Universala Kongreso de Esperanto en **Zagrebo** el la jaro 1953. En Esperanto okazis ankaŭ unu el la adiaŭaj paroladoj sur lia tombo, tiu de lia samklubano el **Split, Davor Grgat.**

D. Grgat

Božidar Brezinščak Bagola

GRANDA ARBO JUGLANDA

Granda arbo juglanda
brilo kaj ombro de nia korto
sub kiu ni ariĝis
kunsidis kaj recitis
ĝuis rostitan viandon
trinkis fajnan vinon

granda arbo juglanda
superis ĉiujn atendojn
per siaj densaj branĉoj kaj folioj
regalis nin per fruktoj de pasio
per kuko juglanda dum naskotagoj
per forta vivovolo

granda arbo juglanda
komencis sekiĝi
ni devis ĝin haste faligi
de ĝia aĝo longdaŭra
postrestis nur brullignoj
kaj insida timo de morto.

Esperantigis Zlatoje Martinov



"Juglando en mia korto" - fotis Ivan Špoljarec - Štef